

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro: Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = 15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
frankoj 4,25 = rejsoj 800 = rubloj 1,50. 8 kopekoj — por duonpaĝa petitfolio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

Uppsala.

Januaro 1897.

N:o 1.

La nova jaro.

En la jaro 1897 "Lingvo Internacia" estos eldonata ĉe tiuj samaj kondiĉoj de abono, ĉe kiuj ĝi estis ĝis nun eldonata; ĉiumonate eliros unu numero, kiu enhavos *ne malpli*, ol 16 paĝojn.

Multaj el niaj abonantoj plendas, ke la gazeto estas eldonata tre neakurate, ke la numeroj konstante malfruigas kaj ke multaj numeroj tute ne estas ricevataj. Parte tio ĉi estas nia kulpo, parte la neakurateco ne dependas de ni. Komencante la novan jaron, ni povas promesi, ke ni faros ĉion eblan por ke la gazeto eliradu pli akurate. Niaj legantaj memoru, ke eldonante la gazeton ni renkontas sur nia vojo multe pli da malfacilaĵoj, ol ia eldonanto de nacia gazeto kaj ke ni ne estas eldonistoj kaj ĵurnalistoj *laŭ la profesio*: eldonante la gazeton ni mem *lernas* ĝin eldonadi. La sperto de la jaro ĵus pasinta iom instruis nin kaj kompreneble ni uzos tiun ĉi instruon por la nova jaro.

De multaj flankoj ni ricevas leterojn kun deziro, ke nia gazeto eliradu pli ofte: du fojojn en la monato aŭ eĉ ĉiusemajne. Tion ĉi ni mem plej sincere deziras, sed bedaŭrinde ĉe la nunaj kondiĉoj la plioftigado de "Lingvo Internacia" estas absolute neebla. Kiam ni atingos, ke nia gazeto elirados tute regule, kiam la enspezoj fariĝos pli grandaj ol la elspezoj, nur tiam ni povos pensi pri la plioftigo de la gazeto.

Ni ne havas ankoraŭ ĉiujn sciigojn por presi la raporton pri la financa stato de nia gazeto. Ni esperas, ke en la sekvanta aŭ en la marta numero ni povos ĝin fari.

Dezirante la feliĉan novan jaron al ĉiuj niaj legantoj, ni devas tie ĉi adresi nian plej sinceran dankon al ĉiuj esperantistoj, kiuj helpis al ni per kunlaborado, alsendante al ni materialojn por la gazeto. Ni esperas, ke ili ne rifuzos al ni sian helpon ankaŭ en la nova jaro.

La redakcio.



La pasinta jaro.

La jaro, kiu ĵus finiĝis, estis tre favora por nia lingvo kompare la jaron 1895. Neniaj eksteraj malhelpoj baris nian vojon kaj ni progresis en diversaj landoj, riĉigante la literaturon per novaj verkoj kaj multigante la nombron de esperantanoj. En tiu ĉi noto ni deziras memori niajn legantojn nur pri la plej gravaj sukcesoj de l' lingvo. Sendube el ĉiuj landoj, kie la lingvo progresis en la jaro pasinta, la plej gravaj sukcesoj estis atingitaj en *Francujo*.

Danke al senlaca propagando de s-ro L. de Beaufront preskaŭ ĉiu nova numero de nia gazeto raportis pri novaj sukcesoj, pri novaj venkoj de nia lingvo en tiu ĉi lando. La plej grava sukceso, atingita de nia laborema amiko, estas sendube en tio, ke la francaj ĵurnaloj kaj gazetoj komencis iom post iom rilati nian lingvon pli serioze kaj pli favore ol antaŭe: anstataŭ moki Esperanton aŭ tute silenti pri ĝi, la francaj ĵurnalistoj turnas atenton al ĝi, ekzamenas ĝin kaj nomas ĝin tre taŭga por diversaj celoj. Kompreneble tre gravan helpon al la propagando faras "*L' Etranger*", kiu konstante donas modelojn de la lingvo, raportas pri ĝiaj sukcesoj kaj tiamaniere liveras praktikan konfirmon al ĉio, kion s-ro de Beaufront diras teorie. La rezultatojn de tiu komuna laborado ni jam vidis: la velocipedistoj, la filatelistoj, la stenografiistoj akceptis, ekzamenis, aprobis nian lingvon kaj uzas ĝin por siaj celoj. Diversaj societoj de paco, kies prezentantoj kolektiĝis en Buda-Pest, mendis al speciala komisiono ekzameni nian lingvon kaj raporti pri ĝi en la sekvanta kongreso. Se ni rememoros, ke ĉiu nova al ni aliĝinta ĵurnalo, societo aŭ aparta persono fariĝas nova propagandisto, ni povas diri, ke la nuna jaro estos ankoraŭ pli feliĉa por nia lingvo en Francujo, ol la pasinta. Ke tiu ĉi diro fariĝu vero!

En *Svedujo* la sukcesoj de nia lingvo estis de iom alia speco, ol en Francujo: ŝajne ni ne eraros, se ni diros, ke la svedaj esperantistoj dum la pasinta jaro laboris pli ol antaŭe *por la literaturo* de la lingvo, verkante kaj tradukante. La saman ni povas ankaŭ diri pri *Portugalujo*. La malnovaj esperantistoj scias, ke ĝis nun sur tiu ĉi kampo, sur la kampo de literaturo, laboris preskaŭ sole la rusaj esperantistoj; tio ĉi ne povis ne influi unuflanke la stilon de Esperanto, donante al ĝi ian apartan nuancon. Tamen la stilo vere internacia devas eviti similajn naciajn nuancojn kaj ĝin devas ellaboradi homoj el la plej diversaj nacioj. Tial la laborado de svedoj kaj portugaloj fariĝas speciale grava kaj multekosta; kredeble, kiam la lernolibro portugala, verkita de s-ro *Costa e Almeida* estos preta, ni kalkulos pli da portugalaĵ nomoj en la nomaro de niaj tradukantoj.

La esperantistoj en *Rusujo* ankaŭ unu post la alia rekomencis sian agadon: en Krasnojarsk, Melitopol, Smolensk, Kremenĉug, Tiflis formiĝis rondetoj de esperantistoj: La odesaj esperantistoj klopodas pri la oficiala konfirmo de sia societo, la societo "Espero" pli energie laboris por la lingvo: la eldono de "Kain", la literatura konkurso, — jen estas la plej gravaj fruktoj de tiu ĉi laboro.

Ni devas ankoraŭ noti, ke en *Belgujo* sukcese propagandis s-ro *Houzeau de Lehaie* kaj ke en la plej malproksimaj lokoj de l' tera globo aperas esperantistoj, vastigantaj la lingvon kaj propagandantaj nian aferon: en *Tunisujo*, en *Alĝerujo*, en *Transvalujo*, en *Madagaskaro*, en *Nova Kaledonujo* aperas la estontaj apostoloj de Esperanto kaj danke al ilia laboro baldaŭ la esperanta parolo eksonos sur la tuta tero.

Ne malgrandan helpon al la vastigado de l' lingvo faris la propangandaj broŝuretoj, eldonitaj de d:ro *Zamenhof*. La esperantistoj, kiuj uzis tiujn ĉi broŝuretojn, devas memori, ke la mono, per kiu ili estis eldonitaj, estis aljuĝita persone al d:ro *Zamenhof**, ke li tamen ĉiam forgesas sian personan profiton, kiam li povas ion fari por la lingvo, kaj tial li uzis la monon por propagandi la lingvon.

Se ni notos ankoraŭ la reviviĝon de l' *Biblioteko*, kies stato nun estas sufiĉe firma, tio ĉi estas ŝajne ĉiuj pli gravaj sukcesoj, kiujn donacis al ni la jaro pasinta. Sed krom tiuj ĉi donacoj ĝi montris al ni ankoraŭ *la rimedon tre efikan* kaj bonan por propagandi la lingvon: ni parolas pri la *vojaĝoj de esperantistoj*. Kiu havis la okazon konatiĝi persone kun alilandano per Esperanto, tiu sendube konsentos, ke similaj konatecoj enverŝas en la animon ian mirinde fortan konvinkon pri la potenco de Esperanto, pri ĝia taŭgeco esti lingvo interpopola, pri la graveco de nia afero. Kiu havis la eblon libere paroli kun homo de alia nacio, ne sciante lian patran lingvon, tiu jam levis la kurtenon, apartigantan unu nacion de alia, tiu jam vidis la anguleton de l' pentraĵo, kiun ni celas montri al tuta la homaro kaj kiu prezentas pacon kaj fratecon de popoloj. — kaj se per helpo de Esperanto vi akiris nur unu amikon ekster via lando, se vi ekamis tiun ĉi amikon, — vi ridos je ĉiuj disputoj pri taŭgeco aŭ netaŭgeco de nia lingvo por komunikigoj internaciaj, vi ridos, kiam oni parolos al vi pri la neperfekteco de la lingvo, pri ĝiaj difektoj, pri "kaj" kaj "ed" k. t. p. Tiuj ĉi disputoj ŝajnos al vi bagateloj, kiuj meritas nun nenian atenton.



Novaĵoj.

— Eldonanto de la Biblioteko fariĝis ankoraŭ s-ro *I. M. Lojko* (50 rubl. ĉiujare.)

* * *

— La lernolibroj de la lingvo Esperanto kaj aliaj esperantaj verkoj estas vendataj en S.-Peterburg en la librovendejo de *Lederle* (Nevski, 42).

* * *

— S-ro *René Lemaire* havis la 7-an de Januaro publikan paroladon pri Esperanto en *Meaux*, sufiĉe granda urbo ĉe Parizo. Kredeble tiu ĉi parolado ne estos la lasta, kiun entreprenos la talenta esperantisto.

* * *

Oferado kaj propagando.

— S-ro *Zakrjêvski* el Smolensk sciigas nin, ke por la intencata de li nova propaganda broŝuro li ricevis ankoraŭ sekvantajn oferojn: de s-ro *Ŝirja-jev* el Jaroslavl — 0,50 r., de s-ro *Podtiagin* — 1 rublon, de s-ro *Lipĉinski*

*) Vidu N:o 2 de "L. I.", 1896, pp. 20, 21.

— 0,50 r., de s-rino *Cerniavska* — 1,75 r., de s-ro *Levaškevič* — 0,50 r., de s-ro *Okolo-Kullak* 0,50 r., kune 4,75 r., kun la antaŭaj 3 r., — 7 r. 75 k. S-ro *Zakrjevski* kore dankas la oferintojn.

— S-ro *Gernet* disdonis kaj dissendis en la lasta tempo 700 da propagandaj broŝuroj en diversaj lingvoj.

— Konforme al sia propono s-ro *Avilov* (Tiflis) transsendis al s-ro *Gernet* 18 r. 50 k. por la celoj de nia afero. S-ro *P. Ĥ. Kadik*, *N. P. Evstifejev*, *V. Ŝtepetilnikov* en Krasnojarsk kaj s-ro *S. I. Kojranski* (el Enisejsk) decidis oferi po 1 % el sia salajro por la celoj de nia afero, kaj sendis jam al s-ro *Gernet* la monon por oktobro 1896: de *Kadik* — 1,30 r., de *Evstifejev* — 1 r., de *Ŝtepetilnikov* — 0,70 r., kaj de *Kojranski* — 2 r., kune 5 r. S-ro *W. A. Ĥristiani* sendis al s-ro *Gernet* 1 r. 50 k. por dissendi propagandajn broŝurojn. Koran dankon al ĉiuj!

— S-ro *A. Naumov* sendis al ni 9,20 r. speciale difinite tiun ĉi sumon por *ilustracioj* de nia gazeto. Koran dankon!

Baloj de esperantistoj.

S-ro *Zakrjevski* skribas al ni:

“La 26-an de Decembro estis aranĝita en Smolensk, en loĝejo de ge:zoj *Jacevič* literatura vespero, kompreneble esperanta, kaj post ĝi — balo de esperantistoj. La vespero komenciĝis per nia himno “Espero“, kiun tre bone kantis malgranda ĥoro. La ĥoron ni havas danke al s-ro *Lipĉinski*. Poste mi legis historion de nia lingvo kaj kantis en lingvo pola ĉe akompano de l' piano. Poste oni prezentis fragmenton el la komedio de Goldoni: “La Amo patra“ en Esperanto (*Pankracio* — A. *Zakrjevski*, *Klariĉe* — fr-ino S. *Jacevič*, *Anĝelika* — fr-ino S. *Viŝnevskaja*, *Lukrecia* — fr-ino P. *Ĉarniavska*, *Skapino* — s-ro I. *Dembski*, *Ĉelio* — s-ro *Podtiagin*, *Silvio* — s-ro *Polonski*). — Kiam la prezentado finiĝis, s-rino *A. Jacevič* deklamis la rakonton en versoj “Nevola mortiginto“. La vespero finiĝis per nia himno “Espero“ kaj tiam komenciĝis granda balo. Oni dancis ĝis la 5-a horo de l' nokto.“

“La 13/1-an de Januaro en mia hejmo estis aranĝita esperanta vespero literatura-muzika. La vespero ree komenciĝis per nia himno, kiun kantis la ĥoro kaj poste plenumis tre bone je violono s-ro *Slonski*. Poste oni prezentis ree la komedion de Goldoni “La Amo patra“. En la prezentado partoprenis: fr-inoj: *Sosinska*, *J. Viŝnevskaja*, *S. Jacevič* kaj s-roj *M. Podtiagin*, *Cieslevski*, *Polonski*. Post la spektaklo fr-ino *P. Ĉarniavska* kantis en lingvo pola kaj fr-ino *S. Viŝnevskaja* deklamis versaĵojn el la “Liro de esperantistoj.“ (NN:o 3 kaj 38). La vespero finiĝis per dancoj, kiuj daŭris ĝis la 5-a horo de mateno. Al ĉiuj gastoj oni disdonis propagandajn broŝurojn kaj prospektojn pri la “Biblioteko.“

Novaj eldonoj.

— S-ro *L. de Beaufront* preparas novan eldonon de sia “Manuel“, ĉar de la antaŭa eldono nenia ekzemplero jam restas.

— Eliris eldono dua de l' verko N:o 17 (plena vortaro rusa-esperanta).

Pri Esperanto parolis: En la N:o 5392 de l' rusa gazeto "*Jurni Kraj*" (Suda Lando) estas presita traduko de l' rakonto "Servosoldato" kun la rimarko, ke la rakonto estas prenita el nia gazeto. La tradukon faris s-ro *Pesocki*. — En la n:o 3 de l' nova hebrea ĵurnalo "*Hašiloak*", eldonata en Berlin, sin trovas en la folietono kelkaj mokoĵoj pri Volapük kaj Esperanto. — En la N:o 1289 de la "*Journal de Ciel*", eldonata en Parizo, estas nomita nia gazeto. — En la N:o 11 de l' rusa ĵurnalo "*Marki*" (Poŝt-signoj) estas presitaj grandaj anoncoj pri nia gazeto kaj pri la filatela broŝureto de s-ro René Lemaire. — En la N:o 9-10 de "*L'Etranger*" estas presitaj kelkaj novaĵoj pri nia lingvo; la artikoleton skribis s-ro *L. de Beaufront*. — En la N:o 12 de l' sama ĵurnalo estas presita (en Esperanto kun franca traduko) la fino de l' artikolo de s-ro *Jan Janowski*: "*Université Autodidactique*". En la N:o 1 de "*L'Etranger*" estas presita fragmento el la "*Fantomoj*" de V. Korolenko (traduko de V. Gernet) kun tre bona franca traduko de s-ro *L. de Beaufront*. En tiu ĉi sama numero sin trovas ankaŭ tre favora bibliografia noto pri la "*Boris Godunov*" en traduko de s-ro V. Devjatnin (la noton skribis s-ro *René Lemaire*), kaj anoncoj (en Esperanto) de s-roj Arduin kaj Gernet. — En la N:o 2 (januara) de "*L'Etranger*" estas presita tre favora bibliografia noto pri la esperanta traduko de "Fantomoj" de V. Korolenko. La noto estas subskribita: *René Lemaire*. En la sama numero sin trovas ankaŭ en Esperanto la anonco de s-ro Devjatnin pri lia verkaro. En kelkaj n:oj estas presitaj leteroj al la redakcio, de diversaj personoj kiuj rekomendas Esperanton. Ni en sekvanta n:o donos tradukon de kelkaj inter ili. — En la rusa gazeto *Vokrug Seĵeta*, n:o 22 (9 junio) 1896, kiun oni alsendis al ni, troviĝas artikolo *Švedy w Rossij* — Svedoj en Rusujo — el la lingvo internacia. Estas traduko de la artikolo "Impresoj de svedoj, vojaĝantaj en Rusujo" de s-ro *V. Langlet*, en nia prova n:o (Dec. 1895). La tradukon faris "Selezpev" (ĉu s-ro Seleznet?). — La lastaj numeroj de la gazeto "*Le Grand Sténographe*" enhavas daŭrigon de l' esperanta kurso por stenografistoj kaj de l' stenografia kurso por esperantistoj.



Malgrandrusa kanto.

Mi, mizera, malfeliĉa,
Neston ne posedas —
Kaj ne povis mi en mondo
Kanti ĝoje, gaje!...
Flugu, kantu vi al tiuj,
Kiuĵ ĉiam gajas:
Ili de kantado via
Certe amuziĝos.

Ne pepadu, najtingalo,
En matino frue,
Ne pepadu, malgrandeto.
Sub fenestr' proksime...
Via kanto estas bela,
Tone vi kantadas,
Vi, feliĉa, jepariĝis
Kaj nesteton havas.

Sed al mi kantado via
Bruston nur disŝiras,
Koron pikas kaj animon
Al turmento donas...
Strigo — birdo por mi restu:
Ploras ĝi, ne kantas...
Ploru, strigo, ploru, ĝemu,
Morton al mi voku!...

V. Devjatnin.



Kion volas Henrik Ibsen. ¹⁾

Henrik Ibsen staras en neordinara rilato al la legantoj. Liaj dramoj estas atenditaj kun la plej fervora intereso, estas legataj aŭ vidataj kun la sama sento, estas konfesitaj kiel ĉef-laboraĵoj kaj — laste kaj fine lasas grandan parton de siaj legantoj... nekontentigitajn.

Se oni demandas la kaŭzon de tiu ĉi stranga rilato, kredeble la plej multaj respondos: — Ni interesigaĵas je la grandaj kaj gravaj demandoj kiujn li prenas por esplorado en siaj verkoj; sed ni *ne* nin sentas kontentigitajn per la respondoj je tiuj demandoj, kiujn li donas. Ĉar vere ili tute ne estas respondoj; li ĉiam finas per ia nova demando.

Kaj sekve ofte estas dirita, ke Ibsen “nur detruas, sed ne konstruas”, ke li nur montras al ni, kiom estas malbona, mizera la tempo, sed ne kiamaniere tiu ĉi mizero estos kuracita, — ke li pentras al ni nur malrekte elvolvitajn karakterojn, sed ne idealajn, imitindajn figurojn, — ke al li “mankas ideema kredo kaj konvinko”, — ke li estas “la poeto de l’ dubo”.

Profundigu tiun ĉi opinion, kaj vi necese devas diri, ke Ibsen tute ne estas poeto. Plej precize kaj difine tiun ĉi konsekvencon eltiris Georg Brandes ²⁾. “La poezio de Ibsen”, li diras (ĉefe koncernante ‘Brand’) “batalas en la servo de unuflanka religia konvinko, kaj tre ofte tiel senrilate kaj esceptinte, ke ĝi stariĝas malamiko kontraŭ tuta la vivo de fantazio, kies traklarigita figuro estas la poezio.” Tio ĉi ja estas sufiĉe klare: poezio malamiko de l’ fantazio estas proksimume egala al ia religio malamiko de l’ pieco, religiemeco!

Precipe klarigas tutan tiun-ĉi rigardadon je l’ poezio Ibsena la ekzemplo, kiun Brandes altiras por apogi sian severan juĝon: “la malpermeso de Brand por Agnes okupi sian fantazion per la mortinta infano.” Tio ĉi klare montras ke por la kritikisto estas *Brand* nenio alia ol *Ibsen mem*, li estas nur ia “parolilo” por la opinioj de l’ poeto koncerne la rilatojn de l’ homo kun Dio.

Kaj precize tiu rigardado ankaŭ donis la kaŭzon al la diro ke Ibsen nur detruas, ne konstruas, k. t. p.

Ĉar ordinare oni opinias la ĉef-karakterojn en la verkoj de Ibsen ne poeziajn individuojn sed personifikaciojn de la sociala aŭ morala problemo, kiun la dramo koncernas, kaj tipojn ĉiu de sia grupo de l’ homa gento, ĉiu de sia flanko de l’ homa anima vivo. Brand por multaj legantoj *ne* estas Brand, — li estas la pastro, aŭ pli ĝuste, la homo, en lia rilato kun Dio: kaj Nora *ne* estas Nora sed la virino-edzino. Kaj kaŭze de tio ĉi dum la fervora batalado pri “Dukkehemmet” ³⁾ sempre la demando estis *ne*: ĉu por Nora estis sufiĉa kaŭzo forlasi Helmer? *sed*: ĉu edzino havas rajton forlasi sian edzon? — Tio ĉi estis, laŭ la opinio de multoj, la demando, kiun volis solvi Ibsen en sia verko; sed ĉar la solvo kiun li donis, nur povis vekti novajn

¹⁾ Tiu ĉi artikolo estas skribita de la finlanda scienculo V. Vasenius kiel enkonduko por lia esplorado de la dramoj de H. Ibsen. Kvankam la artikolo ne estas tute nova, ĝi eble estos interesa por niaj legantoj, en tiu ĉi tempo kiam la granda norvega “enigmulo” donas al la mondo unu enigmon post la alia — plej laste la “J. Gabriel Borkman”.
La red.

²⁾ La granda dana kritikisto.

³⁾ “Dukkehemmet” = Pupahejmo, dramo de Ibsen; *Nora* estas la ĉefa karaktero de ĝi.

senfinajn diskutadojn, jam estis klare videble, ke la respondo ne povis esti rigardita kiel definitiva — tiel: la poeto “nur detruis, ne konstruis”, nur “metis novan torpedon sub la ŝipego.”

Mi bone komprenas tiun ĉi manieron de rigardo, ĉar unu fojon ĝi estis ankaŭ mia.

Tiel, mi antaŭ kelkaj jaroj konatiĝis kun “Kärlighedens komedie”¹⁾. Kun fervora intereso mi tralegis la libron, kun ia certa kolera rideto mi salutis ĉiujn ĝiajn mortigantajn hakojn kontraŭ la malalteco kaj prozo de l' tempo — sed la fina impresoj? Jes, ĝi kompreneble estis, ke laŭ la opinio de Ibsen nenia vera amo ekzistas, ke la *quinta essentia* de l' verko kaŝigis en la vortoj:

“Nå lad forgå hvad tiden ej kan bære,
en tevands skål til salig Amors äre.”²⁾

Dume, nur kelkajn monatojn pli poste okazigis, ke mi vidis la saman “Kärlighedens komedie” en la teatro de Kristiania. — Ĉu mi povis kredi al miaj okuloj kaj oreloj? Ĉu tiu dramo, kiun mi nun vidis, vere estis la sama akra, pesimista atako je nia tempo, kiun mi antaŭ ne longe konatiĝis? Nun al mi sin prezentis drama figuraĵo, tiel riĉa je la plej belega poezio, ke mi post la rigardado de ĝi estis preta kun Falk ekvoki:

“Jeg råber glad endda:
Guds fagre kærlighed på jord, hurra!”³⁾

Kiu estis la kaŭzo de tia diferenco en impresoj? Mi ne trovis alian kaŭzon ol la diverseco de la senta stato, en kiu mi legis la verkon kaj tiu en kiu mi ĝin vidis — la unuan fojon mi staris meze en la fortaj bataloj de elvolvigo, la alian do jam novaj impresoj kaj la ripozo de ia tempo povis el mia animo forigi ĉiujn “demandojn brulantajn”: mi nune estis nur trankvila rigardanto kaj ne kunaganto en la dramo. Similan sperton mi poste ofte povis fari ne nur en mia propra daŭrigita studio de l' verkoj Ibsen'aj sed ankaŭ aŭdante la juĝojn de aliaj. Dum oni en ia societo fervore diskutis la “tendencon” en “Ett dukkehjem” kaj elirinte de tiu tendenco trovis la rezultaton ne kontentigan kaj la pentradon de Nora malkonsekvencon, mi aŭdis ian eminentan natur-scienculon, kiu ne multe konante la tutan “bataladon”, tute trankvile nomis la dramon ian “sciencan” verkon. Por lia rigardo ŝajne la elvolvigo de l' dramo montris la severan konsekvencon, kiun oni postulas de la argumentado en la “eksaktaj” sciencoj.

Kial li vidis konsekvencon, kiam ĉiuj aliaj nur trovis malkonsekvencon? Ĉar li, kiel scienculo, al kutimiĝis serĉi la solvon de l' enigmoj de l' vivo ne en la poezio, kaj ĉar li tiel ne postulis de la verko la instruon, kiel devas ia edzo rilati al sia edzino — unuvorte: ĉar la *tendenco* de l' verko por li ne ekzistis.

Tielaj kazoj povas vekti la suspekton, ke entute la tendenco, kiun oni ĉe Ibsen serĉas kaj pensas trovi, eble ne apartenas al la poeto sed al la leganto. Ke tio ĉi estas *eblo* ne povas *a priori* esti neigita. Kiel ofte ne okazis ke ia scienculo — li laboru kiom ajn konscienceme — estas kulpigita

¹⁾ La komedio de l' amo. *Falk*, unu el la ĉefaj karakteroj.

²⁾ Nun, lasu perdiĝi, kion ne povas porti la tempo. En te-akvo ni trinku al l' “eternigita” Amor’.

³⁾ Mi krias gaja tamen: Belega Dia am’ sur ter’, hurah’!

kiel metanta sian sciencon en la servo ekz. de l' ateizmo? Kaj kial ne povus okazi io simila al la poetoj?

Vere, la historio de l' literaturo montras, ke sufiĉe ofte okazis. Antaŭ cent jaroj multaj sendube opiniis la "Werther" de Goethe nenion alian ol defendo de l' mem-mortigo, kaj volis la poeton fari kulpan, ke kelkaj junuloj por "Werther-ado" estis igitaj meti finon al sia vivo. Kaj tamen nenie en la tuta "Werther" Goethe estis tiel malmulte "tendenca" kiel en la rakonto pri la mem-mortigo, ĉar tiun li tute simple transskribis el la notizo pri ia simila vere okazinta faritaĵo.

Estas mia konvinko, ke ankaŭ la verkado de Ibsen tiel rilatas, t. e. ke oni en liaj dramoj tre ofte serĉas ian "tendencon", kiu tute ne estas en ili, aŭ almenaŭ ne estas ilia ĉefa celo.

Por prui la veron de tiu ĉi konvinko oni devas antaŭ ĉio fari de la dramoj Ibsen'aj la plej diligentan analizon, kaj kolekti en unu tutajon la diversajn trajtojn de karaktero de ĉiuj la agantaj personoj. Se tiam troviĝas, ke la dramoj rigarditaj el *ne* tendenca punkto de vido, montras sin harmoniajn kreitaĵoj de arto, enhavantajn konsekvencajn elvolvigojn de la funda ideo; kaj se oni krom tio trovas, ke en tiuj-ĉi dramoj estas kun ĉiam pli granda klareco kaj certeco prezentata ia alta idealo, ia fidema opinio pri la stato de l' homo en la vivo — tiam ja neniu do devas dubi preferanta tiun-ĉi manieron de rigardo antaŭ tiu, kiu en la nomitaj verkoj trovas nur konsternon, senordon kaj pesimismon.

Trad. V. L.—t.



Al morto.

Ho, venu mort'! Sen plendo, sen doloro
En viajn brakojn mi enĵetos min...
La revoj trompis min, laciĝis koro
Kaj paco nur en tomb' atendas min.
Foriĝis miaj belaj idealoj.
Forflugis la esperoj sen reven'.
Mi estas nun tro-sata je bataloj;
Ho, venu, mort', mi prenos vin kun ben'!...

D. Jegorov.



La betulo.

(El A. Kursinski.)

Al lago malgaje betulo sin klinas,	Ĝi staras, kaj revas, ne scias deziron,
Sin donas al blua profundo,	Ne tuŝas la vent' foliaron...
Kaj tie ĝi vidas la revon benitan	Nek pelas per dubo tempetoj preteraj
Kaj lunon sur akvo senfunda.	Dormecon kaj ĝian donaron.

El lingvo rusa trad. Nikolo Setov.



Letero de voĵanto.

En tiu ĉi letero mi ne penos priskribi miajn komunajn impresojn el mia aŭtuna vojaĝo, ĉar ili kvankam eble povus esti interesaj, okupus tamen tro multe da loko. Tial mi nur limiĝos je priskribo de disvastiĝo de Esperanto, aŭ — pli ĝuste — plena neekzisto de ĝi en la landoj, tra kiuj mi vojaĝis.

En norda Aŭstrujo oni eĉ ne aŭdis pri "ia lingvo internacia", kaj la disdonitaj de mi broŝuretoj estis efektiva novaĵo inter tieaj "kleraj" homoj. Sed tie la poloj ne estas ankoraŭ tiel germanitaj, ke ili ne sciu polan lingvon: sekve la interkomunikiĝo de pola turisto kun la loka loĝantaro prezentis nenian malhelpojn... Pli malbone estis por mi en Kopenhagen.

La ĉefurbo de tiel ĉivilizita lando, kiel estas Danujo, havas perfektan karakteron de eŭropa urbo krom unu cirkonstanco — malesto de esperantistoj tie. Ne sciante danan lingvon, mi ne sole ne povis interkompreniĝi per la lingvo germana, sed mi trovis nenium, kiu povus paroli en ia lingvo ne-dana. Ke en Kopenhagen ekzistas homoj, sciantaj alilandajn lingvojn, mi ne dubas, sed sur mia vojo mi renkontis nenium el ili. Mi decidis trovi ian polon kaj tio eĉ prosperis al mi, sed... tiu "polo" krom la pola nomo havis nenion komunan kun mia nacio. Tiamaniere mi restis soligita en bruanta urbo, plena da homoj, plena da vivo... Pri Esperanto oni aŭdis tie nenion. Tial mi devis uzi mian "laman" svedan lingvon, kiu estas pli komprenata en Kopenhagen ol ia alia, tamen la interkompreniĝo estis sufiĉe malfacila. En tiu ĉi urbo estis neniu, kiu povus klarigi al mi ion aŭ informi pri ia afero. Mi iradis en la stratoj kun la plano de l' urbo en la manoj, kvazaŭ ia angla turisto, kiu eĉ ĉiu paŝo devas etendadi librojn kaj grandan folion de l' plano de la urbo kaj... nur kaŭzadi haltiĝojn de l' preterirantoj.

En tiu ĉi stato, rigardante fremdajn homojn, mi ekkonis pli bone la utilon de nia kara lingvo internacia, kiun ja ĉiu klera homo, dano ankaŭ, povus facile lerni, multe pli facile, ol ian alian lingvon. La pruvon de tio mi spertis je mi mem, ĉar lernante svedan lingvon en daŭro de du jaroj, mi scias ĝin precize tiom kiom estas bezona por vekti en svedo veran ridon je mia sveda parolado. Vere, mi komprenas svede, sed skribi svedan leteron estas multe pli, ol permesas miaj fortoj. Tamen inter svedaj esperantistoj mi min sentas egale, kiel inter miaj kunlandanoj kaj iliaj hejmoj ŝajnas al mi kvazaŭ mia propra hejmo. Se ne ekzistus la lingvo internacia, kiu donas al ĉiu la eblon facile interkompreniĝi kun ĉiu alilanda esperantisto, la homaro starus en la praktika vivo de vojaĝoj ankoraŭ sur primitiva ŝtupo de interkomunikiĝoj... Kaj mi devas nur miri, kial la danoj, la nacio tiel progresema, por kiu ja eĉ estas eldonita lernolibro de internacia lingvo, ankoraŭ ne interesiĝis je tiu ĉi potenca civilizilo...

Sed ni jam metu flanken la aferon de interkompreniĝo. Ia ajn adreso de abonanto de nia gazeto en Kopenhagen jam donus al la esperantisto la eblon por sin turni al tiu abonanto kaj, kiel ĉe amiko, trovi ĉe li helpon aŭ klarigon...

Ho ve! Eĉ tia bagatelo ne ekzistas en Kopenhagen!

Tiel malproksima lando, kiel Islandujo, kiun tre malofte iu vizitas, kalkulas tamen jam kelkajn esperantistojn inter siaj anoj, kaj unu el ili faras al mi plezuron de l' interkorespondado kaj certigas min, ke baldaŭ en Islandujo la nombro de niaj amikoj pligrandiĝos... Videble la Danujo, kiu

volas estradi la "malgrandan" Islandujon, en tiu ĉi rilato staras ankoraŭ pli malalte, ol tiu ĉi lando de vulkanoj kaj glacio...

Ŝajnas al mi, ke turniĝo al glora dana verkisto Georg Brandes ne restus sen fruktoporta sukceso kaj ke tiu ĉi klera eŭropa homo komprenus la gravecon de nia afero, kaj ekparolus pri ĝi en danaj ĵurnaloj. La voĉo de Brandes havas ne pli malgrandan signifon, ol la voĉoj de Max Müller, Henri Phillips kaj Leo Tolstoj, kiuj movis nian aferon sufiĉe antaŭen. Sekve se iu el la amikoj de Esperanto sin sentas sufiĉe forta en lingvo dana, aŭ... franca, li povus prezenti letere al dana scienculo nian utilan aferon kaj la verkojn N:o 22, N:o 33 kaj N:o 86.

Kaj povas esti, ke ĉiu el niaj amikoj, vojaĝontaj somere Svedujon por vidi interesan kaj instruantan ekspozicion en Stockholm, volonte flankigus sian vojon de Malmö por viziti la danan ĉefurbon, en kiu tiam certe estus kelkaj esperantistoj-danoj.

En ĉia okazo oni povas provi tiun ĉi rimedon.

Jozef Wasniewski.



Propagando en vojo.

En vojo la homoj estas tre inklinaj konatiĝi inter si kaj interparoli. Se vi traveturos cent kilometrojn, vi nepre akiros kelkajn konatojn, kaj se vi traveturos mil kilometrojn, vi akiros tre multajn. Tiu ĉi emo de l' vojaĝantoj povas esti utile uzata por nia afero. Se ĉiu objekto taŭgas por la preparado en vojo, objekto eĉ plej bagatela kaj seninteresa, tiom pli la lingvo internacia povas esti objekto de voja parolado, ĉar neniu ja el homoj pensemaj povas ne interesiĝi pri nia ideo. Al mi eĉ ŝajnas, ke la lingvo internacia povas esti objekto de plej viva, plej loga interparolado en vojo. Tial mi konsilas al ĉiuj niaj amikoj, ke ili estante en vojo kaj interparolante kun siaj vojaj kolegoj, tiru la parolon al nia lingvo, ke li havu ĉe si malgrandan provizon da libroj, kiuj povas doni precizan kaj klaran ideon pri Esperanto, kaj disdonu tiujn ĉi librojn al ĉiuj dezirantoj. En simila okazo ĉiu esperantisto donos kompreneble detalajn instrukciojn pri la maniero ellerni la lingvon plej rapide kaj ĉiujn informojn, utilajn al la varbato. Ĉion tion ĉi mi parolas laŭ mia propra sperto. Antaŭnelonge mi faris ĉirkaŭ 100 kilometrojn vaporŝipe kaj povis paroli pri nia lingvo kun pli ol 10 personoj, el kiuj preskaŭ ĉiuj parolis pri Esperanto pli-malpli favore, kaj 4 homoj eĉ prenis de mi kelkajn informojn, kiuj donas la esperon, ke ili lernos nian lingvon. 3 ekz. da N:o 77, kiuj estis ĉe mi, ĉirkaŭiris preskaŭ la tutan kleran publikon de l' vaporŝipo, naskinte amason da interparoloj, konsiloj k. t. p. Kiam mia vojaĝo finiĝis kaj mi estis forlasanta la vaporŝipon, multaj vojaĝantoj dankis min, ke mi donis al ili interesan temon por interparolo, danke al kio ili traveturis grandan parton da sia vojo nerimarkinte kaj sen enuo. Mi jam ne parolas pri la kora danko de tiuj 4 personoj, kiuj postulis de mi detalajn informojn pri la lingvo.

Mi tre rekomendas al niaj amikoj tiun ĉi rimedon de propagando kaj pensas, ke ĝi povas esti tre efikanta kaj fruktoporta por nia afero.

M. S. Rakitski.



Episkopo.

Rakonto el efektiva vivo.

I.

En lukse ornamita kabineto
Sinjoro princo Doro kun edzino sia
Jam longe paroladas en sekreto.
Videble ĵus okazis teruraĵo ia,
Ĉar princo, ordinare tre trankvila,
Ne povis kaŝi nun eksciton de animo,
Princino do, kvieta kaj humila
Nenion preskaŭ parolante eĉ, en timo,
Kun larmoj en okuloj lin aŭskultis.

PRINCO.

En ĉio estas kulpa sole vi princino!
En ĉio!... Mi ne vane vin insultis,
Ankoraŭ kiam vi per larmoj, kun obstino
De via amo blinda, min devigis
Sin hejme edukadi!... Vi al mi ne kredis,
Vi ploris, kaj vi mem ŝin pereigis...
Ho ve! mi ankaŭ estas kulpa, ĉar mi cedis
Al via malsaĝeco!...

PRINCO.

Justa Dio!
Pro kio tiuj-ĉi riproĉoj?! Ĉu mi ploris
Ankoraŭ ne sufiĉe?

PRINCO.

Ha! Pro kio!
Apenaŭ nur rozeto nia ekdisfloris, —
Kaj jam pereas!... Ŝi, Mari', infano
Per amo jam pasia, voluptema flamas...
Al kiu do? Al seminariano!!...
Kaj kiu estas kulpa?

PRINCO.

Mi ŝin tiel amas!...

PRINCO.

Malsaĝa, blinda amo! Oni devas
Sin mem kaj sentojn siajn pli posedi...
Ĉu scias vi pri kio ili revas?
Forkuri volas!... Jen (*donas al princino
taglibron*) — ĉu oni povas kredi.
Ke skribis tion-ĉi flino via?
Taglibron tiun-ĉi mi sub kuseno trovis
En ĉambro de Mari'...

PRINCINO (*traleginte*).

Ho, Dio mia!
Mi tion-ĉi imagi eĉ neniam povis!...

PRINCO (*kun moko*).

Ĉu bone ekinstruis li Marion?

PRINCINO (*legante*).

Jes, jes, — mi vidas mem: ĝi estas ŝia mano
Ĝin skribis efektive ŝi!... Sed kion
Ni devas fari nun?

PRINCO.

Al seminariano
Salajron lian pagi kaj sen vorto
Forpeli lin el domo nia kun ordono,
Ke li neniam eĉ al nia korto
Alproksimiĝu, kaj Marion per admono
Devigos ni forgesi ŝian amon.
Kun ni ne volos ŝi disputi malharmile,
Kaj kredu, ke de am' unua flamon
En juna koro mi estingos tre facile...

II.

Sendube, ĉiu ĝusta romanisto
Ekpentrus tuj portretojn de Mario mia
Kaj de enamiĝita instruisto.
Sed mi ne faros ĝin: mi estus tro partia...
Herooj miaj je unua fojo
En sia viv' per amo reciproka flamas...
Kaj kiel granda, kiel pura ĝojo
Plenigas junajn korojn, kiuj tiel amas!
Feliĉa estas, kiu iam ĉarmojn
Kaj revojn dolĉajn de printempa amo ĝuis,
Sopiris kiu, kiu verŝis larmojn,
Pro miraj ravoj svenis, gajis aŭ enuis!...
Mari' neniam per nenia gesto
Al konfuzema sia instruist' esprimis,
Aludis eĉ pri amo... Nur en kesto
Sekreta kaŝis ŝi taglibron, kiun timis
Elpreni eĉ je tago, kaj en kiu
Ŝi ĉiunokte skribis plenan historion
De sia amo juna. Al neniu
Ŝi volus diri, ke ŝi amas Antonion...

Sed kion sentis Antonio? Sorto
Per sia ĉiam kruda kaj severa mano
Neniam lin dorlotis. — kaj sen vorto
Sufervis malgracia seminariano ...
Li estis eĉ pro tio tre feliĉa.
Ke ĉiutage povis vidi li Marion
Kaj ŝin instrui ... Estis ĝi sufiĉa
Por lia amo: pli li volis jam nenion! ...

En tiu tago, kiam princo Doro
Parolis kun edzino sia pri Mario.
En sia ĝuste definitiva horo
Loĝejon riĉan princan venis Antonio.
Serioza kaj enua laŭ kutimo,
Eniris li salonon, kun esper' sekreta,
Ke tie ŝi ... Sed lin kun malestimo
Haltigis princo mem ĉe pordo kabineta.

PRINCO.

Sinjoro Antonio! Jen alprenu
Salajron vian por monata laborado. (*Donas
al li monon*).
Marion do instrui jam ne penu:
Ŝi povas resti nun sen via instruado.

ANTONIO (*frapita*).

Sed kion ĝi signifas? ... Sed ... vi ... diras ...

PRINCO (*kun moko*).

"Sed, sed" ... sen viaj "sed", mi petas vin
humile!
Mi diris, ŝajne, klare, — kial miras
Vi tiel? Min kompreni estas tre facile.

ANTONIO (*kun tremo en voĉo*).

Vi, sekve, min forpelas? Sed pro kio?

PRINCO.

Ho ne, sinjor', mi vin ne pelas, sed proponas
Forlasi mian domon.

ANTONIO (*kun petego*).

Sed pro Dio ...

PRINCO (*severe*).

Sufiĉe! Ni denune vin jam ne bezonas!
Vi jam ricevis tutan vian monon
Por via laborad', kaj mi al vi ordonas
Por ĉiam nun forlasi nian domon ...
Ĉu vi komprenas min? Por ĉiam!

ANTONIO (*meditante*).

Jes, sinjoro,

Komprenas mi ... kaj ... dankas vin el
tuta koro ...

Adiaŭ, princ' ...

PRINCO (*malpacience*).

Adiaŭ!

ANTONIO (*malrapide forirante*).

Donu Dio

Al vi feliĉon ... Al fraŭlin' Mario
Saluton mian koran mi transdonas ...

PRINCO (*kolere*).

Foriru! Ĝin Mario ne bezonas!

III.

En sopirado de vundita koro
Paliĝis freŝaj vangoj de Mario juna
Simile je rompita bela floro ...
Por ŝi, mizera, ŝajnis ŝia vivo nuna
Malplena, abomena kaj sencela!
Neniu kaj nenio povis ŝin konsoli:
Ŝi sopiradis nur kaj ploris, kaj paroli
Nenion volis ŝia buŝo bela.
Princino ploris, eĉ mem princo Doro
Maltrankviliĝis kaj pro helpo medicina
Sin turnis al sciata profesoro; —
Sed tiu-ĉi al li eldiris: "por fraŭlino
Malsano tia estas tre natura,
Kaj malsaniĝi tiel estas eĉ utile
Por ŝi. Malsan' ne estas ja terura,
Kaj post monato ĝi forpasos tre facile,
Precipe do, se iom per vojaĝo
Vi ŝin amuzos: ĝi en tiel juna aĝo
Efikas ankaŭ ĉiam tre utile."
Kaj jen Mari' kun patro kaj patrino
Amuzas sin per vojaĝado alilanda.
Gepatroj ĉiel penas al fraŭlino
Diversajn plezuriĝojn doni: ĉiu granda
Signifa urbo, ĉiuj poeziaj
Rivero, monto aŭ arbaro, — ĉiuj estis
De ili vizititaj, eĉ neniaj
Vilaĝoj iom belaj sen atento restis ...
De tiu-ĉi vojaĝo tre agrabla
Mari' fariĝis iam pli afabla,
Kaj kora vund' de amo malprospera
Komencis baldaŭ sin kuraci: iam hela

Rideto reaperis jam sincera Pri ŝia juna amo flama kaj pasia...
Kaj bril' antaŭa lumis en rigardo bela; — Ho, kara Antonio! Bedaŭrinde
Ankoraŭ pasis tempo, — kaj en koro Ne ĉiuj amas nin eterne, blinde!...
De lukse disflorinta belulino mia
Nur restis ia stranga rememoro (Daŭriĝo venos.)

V. Devjatnin.



El Heine.

I.

Diru, mia bel-anĝelo, Diru, ĉu ne estas vi Dolĉa revo, songo bela De poeta fantazi'?	Basilisko kaj vipero, Ĉia fabla monstra fam', — Tion kreas kun prospero La poeta krea flam'.
Ne, ho ne, ĉar en vi ĉio, La okuloj kaj buŝet' Estas super fantazio, Super kreo de poet'.	Sole vin kun viaj ruzoj, Kun la rava vizaĝet', Kun l' okuloj ŝajn-konfuzaj Ne elpensos la poet'.

II. *Monta voĉo.*

Malĝoje rajdas kavalir', Lin pikas malesper'. "Ĉu min atendas l' amatin', Aŭ la tombeja ter'?" Kaj sonas el la mont-aer': "Tombeja ter'!"	Li rajdas kun ĝemanta kor'. La malfeliĉa hom'. "Sed eble estas trankvilec' En ĝi, en tomba dom'?" Kaj sonas re la voĉ-fantom': "En tomba dom'!"
--	--

Li rajdas kun malĝoj-anim'
Sur valo kaj herbej'.
"Se estas tiel, kuŝu mi
En ĝi nun, en tombej'!"
Kaj sonas voĉo de l' ŝtonej':
"Nun en tombej'!"

A. Kofman.



Demandoj kaj respondoj.

Demando 5. Ĉu estas permesindaj en nia lingvo la rimoj, en kiuj la lastaj neakcentitaj silaboj ne egalas perfekte unu la alian, kiel ekz.

Kaj ĉu ni buĉas turkon la sovaĝan,
Ĉu la turbana turko pelas nin, —
Egale: iu montras la kuraĝon...

aŭ

En mirindege-bela Maj'
Dolĉ-kantis la birdaro,
Kaj mi la kor-dezirojn
Konfesis al la kara.

La detalajn respondojn ni petas adresi rekte al la redakcio.

Demando 6. Cu la gramatiko de nia lingvo permesas uzi *radikojn* de l' vortoj sen iaj finiĝoj, kiel konjunkciojn aŭ prepoziciojn, kiuj ne havas specialajn finiĝojn, kiel ekz.

rilat = en rilato al
okaz = en okazo de
spec = en speco de
kaŭz = per/por kaŭzo de
rimed = per rimedo de

analogie al

post = dum poste, dum posta...
antaŭ = dum antaŭe, dum antaŭa...
kun = dum kuno, kuna... k. t. p.

Demandas *N. Evtifejev* kaj *P. Kadik*.

Respondo 6. De la redakcio. — Absolute ne: ĉiuj vortoj, kiuj povas esti uzataj sen apartaj finiĝoj estas notitaj en niaj vortaroj per steleto aŭ alie. Se oni povus uzi ĉiujn vortojn sen finiĝoj, la aŭtoro ne bezonus noti kelkajn dekajn da vortoj kaj speciale paroli pri ili.

Demando 7. Kiel la vorto "*sin*" distingiĝas de la sufikso *iĝ*? Ekzemple, ĉu la esprimo *sin porti* ne estas egala al la esprimo *portiĝi*? Ĉu ne tute egale *troviĝi* kaj *sin trovi*, *formiĝi* kaj *sin formi*, *nomiĝi* kaj *sin nomi* k. c.?

T. Ścavinski (Melitopol).

Respondo 7. De la redakcio. — Al ni ŝajnas, ke la verbaj formoj kun *sin* montras ĉiam, ke la agado, esprimata en la verbo, dependas de la volo de l' aganto, dume la formoj kun *iĝ* esprimas la agadon tute nevolan, ne dependantan de l' deziro de la aganto. Por diferenci pli precize inter *sin* kaj *iĝ* oni provu anstataŭ *sin* meti *lin*, *vin*; se la frazo perdas sencan, oni povas esti certa, ke la pronomo *sin* ne estas tie uzebla kaj oni devas uzi la sufikon *iĝ*. Ekz. oni ne povas anstataŭ "li subite paliĝis" diri "li subite paliĝis sin", ĉar tie ĉi la verbo esprimas fakton, kiu ne dependas de la volo de l' persono, kiu paliĝis kaj se oni provos anstataŭ *iĝ* uzi *lin*, *vin* (li subite paliĝis vin) la frazo perdas ĉian sencan. Kontraŭe, ni devas diri "li lavis sin" kaj ne "laviĝis", ĉar li povas lavi ankaŭ vin, ŝin, lin k. c. Kompreneble en multaj fojoj la diferenco inter *sin* kaj *iĝ* ne estas klara, kaj la skribanto aŭ parolanto povas uzi tion aŭ alian, kaj doni al la frazo tian nuancon, kian li volas.

Se iu deziras ion aldoni al tiu ĉi klarigo, ni petas lin adresi tion rekte al la redakcio.



Informejo de esperantistoj.

Deziras korespondadi en Esperanto:

Fr-lino *Marie Boulet*, rue des Bordes. *Louhans* (Saône-et-Loire). Francujo.

Fr-lino *Céline Curtet*, au Collège de Filles. *Louhans* (Saône-et-Loire). Francujo.

Fr-lino *Marie Passot*, rue de l' Hôtel de Ville. *Louhans* (Saône-et-Loire). Francujo.

Fr-lino *Louise Loisy*, au Collège de Filles. *Louhans* (Saône-et-Loire). Francujo.

Fr-lino *Jeanne Plumet*, au Collège de Filles. *Louhans* (Saône-et-Loire). Francujo.

Fr-lino *Marie Lavauc*, au Collège de Filles. *Louhans* (Saône-et-Loire). Francujo.

Fr-lino *Clémence Charnaud*, au Collège de Filles. *Louhans* (Saône-et-Loire).

Francujo.

Fr-lino *Reine Perruchot*, au Collège de Filles. *Louhans* (Saône-et-Loire). Francujo.

Ĉiuj nomitaj fraŭlinoj estas lernantinoj en "Collège de Filles", havas la aĝon de 14 ĝis 20 jaroj kaj deziras korespondadi kun eksterfrancaj fraŭlinoj. Krom tio deziras korespondadi ankaŭ la sekvantaj personoj (ĉiuj en Francujo):

Fr-lino *Loise Lefebvre*, ekslernantino, rue Dubreuil. *Louhans* (Saône-et-Loire).

Fr-lino *Angéline Rebouillat*, ekslernantino, à *Mervan*, près *Louhans* (Saône-et-Loire).

Fr-lino *Julie Laffly*, institutrice, au *Loutelet* par les *Hôpitaux-Neufs* (Dubs).

Fr-lino *Augustine Alvin*, chez Mr Alvin, docteur en médecine, à *Saint-Etienne* (Loire).

Fr-lino *Zablon d'Her*, chez Mr Roux, avocat, professeur de droit à la Faculté catholique à *Lyon* (Rhône).

Fr-lino *Alice Smith*, chez mille Dardarin à *Thouars* (Deux-Sèvres).

Fr-lino *Marie Dubey*, directrice des postes à la *Balme* (Isère).


Fr-lino *Hortense Dussert*, au *Monestier-de-Clermont* (Isère).

Fr-lino *Alice Roux*, professeur d'allemand au Collège de Filles, *Louhans* (Saône-et-Loire).

S-ro *Gabriel Chavet*, élève au collège de *Louhans* (Saône et Loire). *Francujo*.

Agento de la lingvo Esperanto:

4. Klubo Esperantista. *Uppsala, Svedujo*.



Adresaro de niaj abonantoj de la pasinta jaro:

Svedujo:

511. Fr-ino *Gerda Ödmann*, Villa Kina. Haga. *Stockholm*.

512. Fr-ino *A. v. Schmitterlöw*. Tagel. *Moheda*.

513. *Karl Erikson*. *Uppsala*.

Finlandujo:

514. Fr-ino *Signe Blomberg*. *Åbo*.

Anglujo:

515. Fr-ino *Gerda Linde*. 20 Falhot Road Bayswater. *London W*.

Brasilujo:

516. S-ro *F. V. Lourenco*. Colonia São Feliciano. *Est. Rio Gr. do Sul*.

517. Nekonata poŝtabonanto.

ANONCOJ.

MARKI.

Poŝtsignoj, Timbres-Poste, The Stamps, Die Briefmarken, Gli Francobolli, Los Sellos.

Ĉiumonata ilustrita ĵurnalo por filatelistoj, organo de l' Moskva societo filatelista.

Kosto de abono — 1 rublo, sur la papero pli bona — 2 rubloj.

Oni abonas ĉe s-ro *C. D. Solomkin*:
Rusujo. Kiev. Bulvarno-Kudrjavskaĵa, 23.

La ĵurnalon

"L'Etranger",

kiu presas artikolojn interalie en la lingvo Esperanto.

oni abonas en Rusujo ĉe s-ro
V. Gernet,

Odessa. Puŝkinskaĵa, 44.

La abenpago — 2 r. 80 k. por unu jaro.

La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio *Santiago*, Hospitalillo 9, (Coruna).
- „ **Portugalujo** ĉe dro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Puŝkinskaja, 44, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

Bankiera Domo HENRIH BLOKK

en *S.-Peterburg* vendas

biletojn kun gajnoj de la 1-a, 2-a kaj 3-a (Dvorjana) pruntoj kun iam-post-iamaj pago.
— La antaŭdono estas 20,15 kaj 12 rubl. por unu bileto. — La ĉiumonata pago — 10 aŭ 5 rubl. — La 2-an de januaro estas tiraĵo de la 1-a prunto.

La reprezentanto por Odeso:

Jakov Lipovic Hersencvit,

la sola reprezentanto por Odeso kaj Suda Rusujo de modaj ĵurnaloj de ĉiuj landoj de l' mondo, abonado kaj ponumera vendado. — Akceptado de asekuroj de l' vivo de la asekura societo "Zabotlivost". — Kafo "Hektor". — Reprezentanto de la firmo de Jozevski en Kiev por la vendado de mueliloj de fratoj Zek en Dresden. — Apartenaĵoj por mueliloj, ŝvisaj kribriroj k. c. — Akceptado de la reprezentadoj. Oni bezonas agentojn. — Odeso, *Riŝeljevskaĵa* 25.22. — Telegramoj: *Odessa* — *Hersencvit*.

Mi deziras korespondadi kun esperantistoj bulgaraj kaj ukrainaj (malgrandrusoj) por ekzerci malgrandrusan lingvon kaj bone ellerni la bulgaran. Kiu volos helpi, tiun mi petas skribi laŭ la adreso: Rusujo, Varsovio Zórawia, N:o 15, m. 9. A. Prohoroviĉ-Koĉmarenko.

Personoj kiuj volas esti agentoj de la lingvo Esperanto en Svedujo volu sin turni al la Klubo Esperantista en Uppsala. Agento de Esperanto devas promesi ke li respondos ĉiujn esperantajn leterojn al si kaj helpos ĉiun Esperantiston, kiu lin vizitas.

Sinjoro E. Arduin

komercisto en *Bordeaux*, 11 *rue Turenne*, **Francujo**, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de siaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinberco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon l' de produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

Ni petas reaboni.

Por eviti malordon ĉe la dissendado de la unuaj numeroj de "Lingvo Internacia" en la nuna jaro 1897 ni tre petas tiujn esperantistojn, kiuj deziras ricevadi plu nian gazeton, *aboni ĝin ĝustatempe*, aŭ almenaŭ sciigi la redakcion pri sia deziro esti abonantoj en la venonta jaro. La kondiĉoj de la abono restas la antaŭaj, t. e. 3 kronoj = 3,30 germ. markoj = 4,25 frankoj = 800 rejsoj = 1,50 rubloj por la jara ekzemplero, kaj unu senpaga ekzemplero al ĉiu, kiu alsendos al ni 4 pagajn abonojn.

La abonantojn, kiuj abonas la "Lingvon Internacian" per la poŝto, ni petas sendi al ni siajn adresojn, por ke ni povu ilin presi en la gazeto.